

Munkenano en la ĉielo

Alois Hingerl, servisto numero cent-sepdek-du ĉe la Munkena ĉefstacidomo, plenumis taskon kun tia rapidego, ke li suferis apopleksion, falis teren kaj mortis.

Du anĝeloj trenis lin kun multe da peno en la ĉielon, kie Sankta Petro akceptis lin. Petro sciigis al li unue, ke ekde nun li obeu je la nomo ‚Anĝelo Aloisius‘, transdonis al li harpon kaj konigis al li la ĉielan tagordon:

„De la oka horo matene ĝis la dekdua horo tagmeze: jubilado. De la dekdua horo tagmeze ĝis la oka horo vespere: kantado ‚Hosianna‘.“

„Kion???”

„De la oka matene ĝis la dekdua tagmeze jubilado; de la dekdua tagmeze ĝis la oka vespere kantado ‚Hosianna‘!“

„Tiel ĉi, mhm. – Nu, kiam mi ricevos ion por trinki?“

“Vian ‚Manna‘ vi certe ricevos!” – diris Petro, iomete indigne, kaj lasis lin al si mem.

„Ho ve. – Kia sengustaĵo fariĝos tio! – Karulo mia, mi timas, ke mi estas mispaŝinta! – ‚Jubilado‘, a-a-a-a! – Lin aŭskultu, ‚jubiladi‘ mi devus ĉi-supre... – Mi pensis, ke mi venos en la ĉielon...“

Kaj dum li ankoraŭ grumblis tiel, li subite vidis proksimiĝantan anĝelon de la ‚ruĝaj biciklistoj‘. Kaj tuj revekigis en li la malnova kolerego pri tiu supozita konkurantaro jam surtera, kaj li alkriis la anĝelon ruĝ-biciklistan:

„Ho, ĉu ankaŭ vi estas ĉi-supre!? – Vi fiuloj mizeraj! – Karulo mia, ĉiukaze ne aperu ĉe mi! Alikaze vi ... (kun mansvinga gesto) kaptos kelkajn...!“

Kaj por sekurigo li donis al la anĝelo ruĝ-biciklista kelkajn fortajn batojn per sia sankta ĉiela instrumento. – Post tio li fartis signife pli bone, kaj kiel ordonite al li, li sidiĝis sur nuboj kaj komencis jubiladi:

„Haalelujaaa – haalelujaaa – haalelujaaa – haleelujaaa!“

Anĝelo tute enpenŝiginta ŝvebis preter li.

„Hola, Vi! – He! (fajfo) – Hola! – Ĉu... ĉu Vi ne havas ‚Schmaizla‘? – Snuf-tabakon? Ĉu Vi ne havas? Unu pinĉaĵon? – Ek, venigu iom!“

La enpenŝiginto nur rigardis lin tute senpenŝigite, lispis nur: „Hosianna!“ – kaj forflugis.



„Ho, kia plenidioto estas nun tiu? – Nu, do, do, do, do vi ne havas snuf-tabakon, ĉu ne?! – Se oni demandas dece, oni ja povas atendi decan respondon! – Vulgara stultulo, vulgara! – Anĝelo, osteca! – Karulo mia, kiaj kanajloj troviĝas ĉi-supre! – A-a-a-a-a! Kion mi devas elteni!“

Kaj li residiĝis sur sia nuboj!, kaj denove komencis jubladon!, sed – signife pli kolere!

„Haleluja! – 'luja! – 'luja, mi diras! – 'cifiks-haleluja! – 'luja!“

Li kriegis tiom, ke apude la kara Dio vekigis el sia posttagmanĝa dormeto, kaj tute mirigite demandis:

„Ho, kia krudulo estas tiu ĉi-supre?!“

Li tuj sendis anĝelon al Petro, tiu lasta rapidege alvenis, kaj kune ili aŭskultis la anĝelon Aloisius dum lia... ‚jublado‘:

„'luja! – Saketon da cement'-haleluja! – 'luja, mi diras – Karulo mia, 'luja!“

Petro rapidege ekflugis kaj trenis la anĝelon Aloisius antaŭ la karan Dion. Tiu rigardis lin longe; poste li diris:

„Aha, Munkenano. – Nu, diru al mi, kial ĉi-supre vi kriaĉas tiel maldece?!“

Sed por tia demando Aloisius estis la malĝusta adresato. Tiu troviĝis tutmeze en sia kolerego kaj nun ekkriis:

„Ho, ho, kion ja kredas Vi? ĉar ni estas ĉi-tie en la ĉielo, tial... tial mi devus kanti kiel fringelo, ĉu? – Ĉu? – Kaj por trinki mi ricevus tute nenion? – Karulo mia, ‚Manna‘, li diris, ‚Manna‘ mi ricevus! – Karulo mia, foriĝu kun via ‚Manna‘! Tiun vi mem povas trinki, tion mi diras al vi! – Sed mi ne trinkos ‚Manna‘, por ke vi sciu! – Kaj mi tute ne kantos! Mi neniam antaŭe kantis! Tiom pli mi ne kantos ĉi-tie!“

„Petro“, diris la kara Dio, „tiu ĉi ne taŭgas por ni ĉi-tie. Nu, al li mi transigas alian funkcion: Li transdonu miajn Diajn konsilojn al la Bavara Registaro. Tiamaniere li venos unu- aŭ dufoje po semajno al Munkeno, kaj tiam lia kara animo havos kvieton.“

Kiam Aloisius aŭdis tion, li estis videble feliĉa. Li tuj ricevis sian unuan taskon – leteron – kaj ekflugis kun ĝi. – Kaj kiam li subite sentis Munkenan teron sub siaj piedoj, li fartis kvazaŭ en la ĉielo.

Kaj, laŭ malnova kutimo, la vojo kondukis lin rekte al la biergastejo ‚Hofbräuhaus‘, - kaj li retrovis sian kutiman sidlokon, - trovis ĝin neokupita, - kaj Kathi, la kelnerino, venis al li, - kaj li ordonis bieron, - kaj li ordonis plian bieron, - kaj li forgesis sian leteron kaj sian taskon, - kaj ordonis plian bieron, kaj plian,... - kaj tie li ankoraŭ sidas hodiaŭ.

Kaj tial ĉi la Bavara Registaro ĝis hodiaŭ vane atendas la Diajn Inspirojn.